

Kulturaj Kajeroj

É.MAHÉ

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Simpla : 25 fkoj
Bonfara : 30 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauviniere
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

NOVEMBRO - DECEMBRO

1976 6

KULTURAJ KAJEROJ

1976 NOVEMBRO - DECEMBRO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

Spiralaj turpintoj kaj romanikaj sonorilturoj ĉirkaŭ Baugé

Malnova skribarto en sud-ameriko (fino)

Ni rigadu la ĉielon A. Masclet

Pri la olivarbo

La speciala trajno malaperis

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ
respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn.

El Grésillon

Jam de kelkaj jaroj samideanoj petis ŝanĝon de nia programo-kalendaro. En 1977 tiu ŝanĝo okazos : tion decidis la Konsilio. La tiel nomitaj Internaciaj Semajnoj okazos dum la unuaj tri semajnoj de julio. Tiamaniere tiuj, kiuj regule vizitas kongreson fine de julio povos partopreni ankaŭ trisemajnan periodon en Grésillon. Koncerne la prelegojn prezentotajn okaze de tiu unua periodo ni ankoraŭ nenion findecidis. Sed ili certe estos tiel variaj kaj interesaj, kiel kutime.

Pri la kursoj okazontaj ĉefe dum la dua kaj la tria periodoj la kutima skemo ne ŝanĝiĝas. Tamen la praktiko-kurso (dua kurso) estos adaptita al ĉiu situacio, t. e. al la konoj de ĉiu lernanto. Tre ĝena estis, ĉefe la antaŭajn du jarojn, la fakto, ke la aliĝantoj al tiu kurso ne nur estis diversnivelaj sed ankaŭ ne ĉiuj alvenis samtempe. La nombro da partoprenantoj, kiuj ĉeestis de la unua ĝis la lasta tago estis nur parteto el la tuta kursanaro, Ni varme rekomendas, ke persono, kiu deziras ĉeesti tiun praktiko-kurson venu ek de la unua tago. Sed se okazos, ke kelkaj alvenos post pli malpli longa tempo, ili ne estos devigataj kapti la ekveturitan vagonaron, sed la gvidanto, helpe de la kursolibro alportita de la kursano instruos kaj praktikigos lin aŭ ŝin ek de liaj aŭ ŝiaj personaj nivelo kaj konoj. La sama kurso okazos ankaŭ dum la unua periodo por la eventualaj interesatoj.

Ni ricevis multajn informpetojn kaj jam eĉ aliĝojn de individuoj kaj grupoj. Do, ne prokrastu vian decidon. Petu la ĝeneralan programon kaj la diversajn informojn. Eksterlandaj gesamideanoj venu multnombraj. Nur vi, partoprenontoj faros la diversajn periodojn vere internaciaj per via multnacia ĉeesto.

Letero de Brita Gasto en Grésillon al Samlandano

Kara amiko,

Ĉi-jare mi havis la plezuron gastiĝi ĉe la kastelo Grésillon, kie mi renkontis malnovajn geamikojn, kaj novajn.

Mi bedaŭris, ke denove vi kaj via familio ne povis partopreni la « Internaciajn Semajnojn ». En la kastelo, oni ofte parolis pri vi, kaj eĉ ni vidis vin dum prezentado de diapozitivoj el sama periodo en la jaro 1975.

La nova salono, kiu pasintjare estis apenaŭ preta, nun havas belan aspekton, kaj estas taŭga por projekcii filmojn. En ĝi, okazis la matenaj prelegoj, kiuj konsistigis interesan sortimenton pri aktualaĵoj, kiel « Novaj Fontoj de Energio », kaj malaktualaĵoj kiel « Volapük », ktp... Unu prelego temis pri la insulo Islando, kie venontjare okazos la Universala Kongreso de U.E.A., kaj klare montris, ke tiu lando estas ja vizitinda.

Ĉe tiu momento, 80 personoj estis en Grésillon el diversaj landoj ; inter tiuj estis geedzoj el Brita Kolombio, Kanado. La edzo naskiĝis en Skotlando, instruis dum kelkaj jaroj en mia regiono Devon, poste elmigris al Kanado, kie li edziĝis al Kanadino ankaŭ el eduka fako.

Antaŭ la finiĝo de mia restado en Grésillon, alvenis junuloj el Anglujo, jam tre bonaj esperantistoj, kaj tiel nia lando estis tre bone reprezentita en la Esperantista Kulturdomo.

La kunvivado en la kastelo sin montris per la kutima etoso, kiu estis sentata kaj videbla en ĉiu anguleto de la konstruaĵo kaj en la ekstera parko. Multnombraj okazintaĵoj, sinsekve plenigis la tagojn de mia restado. Ĝuste pro tio, ke vi-mem jam dufoje travivadis similajn tagojn, mi bone scias, ke vi ne bezonas ke mi priskribu ilin.

Elkorajn salutojn
El Grésillon, Aŭgusto 1976
K. Mc. L.

Esperanto tra la Mondo

Kongresoj, renkontoj jam anoncitaj

— Universala Kongreso, en Rejkjavik, Islando : 30an de Julio - 6an de Aŭgusto 1977. Adreso : U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam - 3002 Nederlando.

— Kongreso de S.A.T., en Augsburg, Germanio : 30-7 - 5-8 ; Adreso : Hermann Schmidt, Alte Reichsstr. 31f, D 8901 Steppach. Postkongreso en Naturamika Domo, ap. Bodenlago, proks. al Svisio (6-13.8).

— Êŝropa Esperanto-Kongreso, Paderborn Germanio 27-31 de Majo. D-ro Hans Kasselmann, Falkenweg 10, D 4790 Paderborn.

— Kongreso de Fervojistoj, Swanwick, Britio, 23 - 30.5.

— Kongreso de la Junularo (TEJO), en Poitiers (Francio, 9 - 16.8 ; Adreso : JEFO, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004 Paris, kie oni povas peti faldfoliojn pri la kongreso.

— Franca Esperanto-Kongreso de U.E.F., en Grenoble, 27 - 31.5 (Pentekosto). U.F.E. : 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004 Paris.

— SAT-Amikara Kongreso, en Bédarieux, Francio, 9-12.4 ; Adreso : Mireille Brunel, « Rossigné », les Aires, 34600 Bédarieux.

Semajno de Internacia Amikeco...

Ĝi ĉiam okazas la lastan plenan semajnon de Februaro, do, en 1977, inter la 20a kaj la 26a de Februaro. La Esperanto-Kluboj estas invititaj aranĝi ion okaze de tiu semajno, eventuale, en ligeco kun neesperantaj organizoj aŭ eksterlandanoj en la urbo. U.E.A. eldonis 4-paĝan « konsilaron » pri tiu manifestacio. Petu ĝin, okaze de mendo de libroj.

Broŝureto de U.E.A. pri la konferenco pri sekureco en Helsinki

U.E.A. povas liveri broŝuron kiu entenas konsilojn por aplikiĝo de la fina akto de la konferenco de Helsinki de 1975 en la agado de la esperanto-movado. Same estas disponebla la kompleta teksto de tiu fina akto, en Esperanto.

Eldonaĵo de Unuiĝintaj Nacioj en Esperanto

Oficejo de Publika Informado, Unuiĝintaj Nacioj, New York, N.Y. 10017, Usono, mem eldonis en Esperanto la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj, sub formo de presita faldfolio. Oni povas peti ĝin kvantete rekte aŭ ĉe la landaj informaj oficejoj de U.N.

Seminario « Lingvo kaj Rasismo »

Dum Aŭgusto okazis en Sarajevo (Jugoslavio) internacia seminario pri la temo « Lingvo kaj Rasismo », en la kadro de la Jardeko de aktivado kontraŭ rasismo de Unuiĝintaj Nacioj. Venis partoprenantoj el 13 landoj por laborkunvenoj de alta nivelo.

Universitata disertacio pri Esperanto

Kun bonega sukceso, Prof. Detlev Blanke, estro de la sekcio Esperanto en Kuturligo de Germana Demokrata Respubliko, defendis sian doktorigan disertacion pri « planlingvo kaj nacia lingvo », antaŭ la sociscienca fakultato de Humbold-universitato en Berlino.

En Soviet-Unio

Prof. Isajev, eminenta soveta lingvisto kaj esperantisto, aperigis kun siaj kunlaborantoj, verkon titolitan « Problemi interlingvistiki », en kiu li traktas la problemojn de internacia lingvo, substrekante la superrangon de Esperanto.

Inter astronomoj

Dum la kongreso de Internacia Astronomia Unio en Grenoble, deko da astronomoj esperantistoj kunsidis sub la prezidanteco de Prof. B. Popoviĉ, prezidanto de Internacia Scienca Asocio Esperantista.

Nacia Kongreso... internacia

La itala konggreso de Esperanto kiu okazis dum Septembro, estis grandega sukceso : ĉeestis 689 esperantistoj el 19 landoj, en Massa. Oni inaŭguris, antaŭ eminetuloj kaj reprezentantoj de la registaro, buston de Zamenhof, en la kastelo Malaspina, nun nacia esperanto-biblioteko.

La Someraj Universitataj Kursoj

Ili okazis dum Aŭgusto en la Universitato de Antverpeno. La programo disvolviĝis laŭ tri studdirektoj : biologio, matematiko kaj sociologio, por pli ol 50 personoj el 12 landoj. La lekciistoj estis 7 universitataj profesoroj aŭ docentoj el 6 landoj.

Novaj eldonaĵoj

— « Dona Barbara » de R. Gallegos, klasika verkisto de la venezuela literaturo. Romano majstre tradukita de F. de Diego. Estus bedaŭrinde ke la Esperantistoj neglektu tiun okazon bone koni sudamerikajn kulturon kaj morojn.

— « Ĥimeroj — les chimères » : dulingva eldono de la verko de la franca poeto Gérard de Nerval. Traduko de G. Waringhien.

— Ĉar esperantista jurio proklamis la skotan poeton Albert Goodheir « aŭtoro de la jaro 1975 », ni memorigas pri lia bona originala poemaro « Merlo kaj menhiro », kaj iliaj tradukoj.

— « Grand dictionnaire Esperanto-Français » de Waringhien estas denove havebla. SAT-Amikaro reeldonis ĝin kun suplemento kiu entenas pli ol mil korektojn, aldonojn, anstataŭigojn, forstrekojn, laŭ la lingva evoluado depost la eldono de 1955.

— « Vortaro Esperanta-Kamboĝa » kiu ampleksas proksimume 2 500 vortojn, presita en Hungario, verkita de junaj kamboĝaj esperantistoj, kiuj lernis Esperanton en Budapeŝto.

— « Bhagavad-Ĝitâ » : represo de la traduko de tiu hinda religia verko, farita el sanskrito de Lorenz.

Amuza sed bona propagandilo franclingva

Aperis sespaĝa broŝureto franclingva de Claude Piron, titolita : « Confession d'un fou européen ». Ni gratulas la aŭtoron, kaj « Kultura Centro Esperantista », strato Postiers, 27 La Chaux de Fonds (Svislando). Ni aldonu ke je tiu adreso estas nun instalita la « Gastejo Edmond-Privat » en kiu la Esperantistoj povas ferii kaj ripozi malmultekoste.

En Pollandaj lernejoj...

En la urbo Kielce, la internacia lingvo estas instruata en la pedagogia altlernejo, en 10 popollernejoj kaj en 3 mezlernejoj.

... kaj en Germanio

Meze de lasta Julio, finiĝis en Paderborn, la 18-monata lingvo-orientiĝa instruado, kiu okazis en Esperanto por 40 elementlernejanoj.

Pensu pri « Juna Amiko » por la junaj kursanoj

La gvidantoj de kursoj, ĉefe en lernejoj, estas atentigataj pri la bona revueto « Juna Amiko », presita en Hungario. La tekstoj estas tute speciale aranĝitaj por la komencantoj. Revueto nepre subtenenda ! Ĝi estas kvarmonata. Ĝi povas interesi la plej maljunaj infanoj kaj la adoleskantoj.

Spiralaj turpintoj kaj romanikaj sonorilturoj

ĉirkaŭ Baugé

Unika rondirado
Michelin-mapo 64
faldoj 2a k 12 a.


Preskaŭ duono de tiu tuttaga rondirado (90 kmj) trairas arbarojn (kverkaj kaj fagaj arbegaroj, pinarbaroj, pritonditaj boskoj kaj forstoj de kverkoj kaj kaŝtanarbaroj, punktitaj de betuloj).

Plejparto de la renkontotaj sonorilturoj surhavas ĉarpentan turpinton. Kvin tiaj turpintoj estas spirale konstruitaj, por pli bone kontraŭstari la ventojn, laŭ diro de la ĉarpentomajstroj, kiuj ilin nomas teknike « torditaj turpintoj ». Ankaŭ deko da tiaj staras dise tra Francio. Tia kvino, je malpli ol dek kilometroj de Baugé, estas **unika en la tuta mondo.**

La ligno estis ankaŭ uzita por la panelaj plafonoj, metitaj kvazaŭ volboj supre de la romanikaj navoj en kelkaj preĝejoj.

La akutaj tegmentaj deklivoj de la kasteloj kaj nobeldomoj (XVa-XVIIIa jc.), kovritaj per ardezoj aŭ tegoloj, ofte kaŝas ankaŭ ĉarpentaĵajn ĉefverkojn.

De Baugé atingu **Echemiré** laŭ la N 766 ; tie nobeldomo kun sesangula tureto (XVa jc.) apud la preĝejo, kies turo kaj absido estas romanikaj. Elirinte de la vilaĝo al Jarzé, laŭiru la dekstran vojon (D 511) kaj poste la D 82, al Cheviré-le-Rouge. Je la alveno, bela vidaĵo al la romanika sonorilturo kaj la malnova priorejo (XVa jc). Ene de la preĝejo, gotika ĥorejo, laŭ la anĵua stilo.



FOUGERÉ

La tiea spirala turpinto ŝajnas la plej malnova en la regiono (XVIIa jc) ; atentu iamajn gratifojn sur la suda muro kaj ene de la sonorilturo. Ene de la preĝejo, ligna volbo (XVa jc) tiam pentrita, sed netaŭge riparita dum la lasta jarcento ; altaro de 1642.
De Fougeré tra St-Quentin, laŭiru la D 138 al **Clefs** : romanika sonorilejo ; ene de la preĝejo, kverka volbo kaj ligne skulptita Kristo (XVIIa jc).
Forlasu Clef laŭ la D 138 al Genneteil. Veturinte nur unu kilometron, laŭiru dekstren la D 139 al Vaulandry : tie romanikaj malsupra parto de la sonorilturo kaj ĥorejo.
Laŭiru poste la D 139 al Lasse ; alvenante ĉe la vojo de Baugé al Le Lude, veturu dekstren laŭ la N 817 al Baugé, kaj poste iru maldekstren al Pontigné.

PONTIGNÉ

Tordita turpinto supre de la sonorilturo (XIIIa jc) ; la tiea pinto (XVIIa jc) spiralas laŭ kvarono de cirklo. La tuta interno de la preĝejo datumas de la XIIa-XIIIa jacj — volboj kaj absido laŭ la anĵua stilo — belaj pentritaj kapiteloj — freskoj de la XIIa-XVIa jcj.
De Pontigné iru al Lasse, laŭ la D 141 (vojo al Chavaignes). Supre de la unua deklivo returne rigardu por bela vidaĵo al la tuta vilaĝo ; veturinte iom, atentu maldekstren, trans kampoj, la iaman nobel domon Puisieux (XVa-XVIa jcj). De Lasse (sonorilturo de la XIIa jc) atingu la N 766 ; laŭiru ĝin maldekstren al Noyant kaj preskaŭ tuj dekstren la D 139 kaj la D 79 al Mouliherne.

MOULIHERNE

Eble la plej eleganta el la spiralaj turpintoj (ĝi datumas de 1693), super la gotika sonorilturo; romanikaj ĥorejo kaj absido; ĉefa navo de la XIIIa-XVa jcj ; bela ĉarpentaĵo supre de la renesanca volbo. En la apuda tombejo, iama ostarejo. Travagu la pitoreskajn stratetojn de la malsupra vilaĝo kaj vizitu la lignoŝufariston.
De Mouliherne laŭiru la D 62 al Beaufort ; la vojo serpentumas tra arbaro ; en valeto ekvidiĝas iama priorejo (prieuré de Vendanger) XVa jc. Ĉe la posta vilaĝo — la Lande-Chasles — unumura sonorilturo, supre de preĝejeto de la XIIa jc. Bela parko ĉirkaŭ la apuda kastelo (XVa, XVIa, XIXa jcj). Retroiru iomete ĝis la flanka dekstra vojo (D 186) al Jumelles. Tie transpasu la N 138, kaj laŭiru la saman vojon al Brion ; ĝi pasas preter lageto kaj kastelo « les Hayes » (resanigejo por geinfanoj).
En **Brion** la preĝejo elstaras supre de monteto : romanika kaj fortikigita absido, sonorilturo de la XIIa-XIIIa jcj. En la vilaĝo atentu plurajn nobeldomojn de la XVIa jc. En eksŝtonminoj subteraj, fungokultivado. Laŭiru poste la D 211 al Fontaine-Guérin.

FONTAINE-GUÉRIN

Sonorilejo de la XIIa jc. ; supre de ĝi « tordita turpinto », kiu spiralas inverse de la aliaj, t.e. de dekstra flanko al maldekstra. Ene de la preĝejo, panela volbo ornamita per strangaj pentraĵoj (XVa jc.).
De Fontaine-Guérin, laŭiru la D 211 kaj la D 259 al **Saint-Georges-du-Bois** : tie vidiĝas la plej bela romanika sonorilturo en la tuta regiono.
Forlasu Saint-Georges laŭ la D 59 al Sermaise ; ĉe la unua vojkruciĝo dekstren iru al Baugé laŭ D 61. Ĉe maldekstra flanko de la vojo, atentu tipan dometon de la regiono, je la loko t.n. « La Fontaine », (fasada luko, apuda puto, ekstera ŝtupareto supre de bakujo...).

LE VIEIL-BAUGÉ

La plej alta kaj la plej kurioza el la torditaj turpintoj, supre de sonorilejo de la XIa jc. ; ĝiaj romanikaj fenestroj estas ŝtopitaj. Ene de la preĝejo bela ĥorejo de la XIIIa jc. kun skulptitaj kapiteloj ; diversepokaj flankaj kapeloj. — Gvidfolio en Esperanto. Survoje al Baugé, je la loko t.n. « La Bataille » (la batalo) ŝtonmemorigaĵo pri franca venko dum la centjara milito (1421).

MALNOVA SKRIBARTO EN SUD-AMERIKO

(fino)

La civilizacioj Nasca kaj Mochica

Tiuj du civilizacioj estas postaj al tiu de Paracas. La arkeologo F. Kauffman ilin situas inter la jaroj 400 kaj 900. Dum pluraj jarcentoj tiuj civilizacioj uzis la Pallar-signon de Paracas sur siaj ŝtofoj kaj ceramikoj. La multkolora ceramiko de la Nasca reprezentas personojn, kiuj portas la samajn insignojn kaj diademojn, kiel tiuj de Paracas. En la muzeo de Lima troviĝas pli ol 280 signoj teksitaj dum tiu Nasca-civilizacio.

La Mochica-teksaĵoj montras la Paracas-signon al kiu aldoniĝis 6 novaj desegnoj skemantaj mesaĝiston kaj pallaroj triope grupigitaj por nova esprimo.

Malapero de la Pallar-signo

Arkeologio kaj kronikistoj signalas, ke la Pallar-signo malaperis sekve al evento milita kaj politika.

La arkeologio mencias, ke, de la perua montoĉeno ĝis la Pacifiko-bordoj, la Tiahuanaco-civilizacio anstataŭis la antaŭajn civilizaciojn.

La kronikisto Fernando de Montesinos starigis la liston de tiuj reĝoj, kiuj antaŭis la Inkaan Imperion kaj kiujn signalis la ŝtofoj de la Fardoj.


Li ankaŭ notis la Inkaajn Princojn kaj la historiajn eventojn. Li menciis, ke, okaze de pestoepidemio, la Inkaa orakolo ordonis, ke oni malaperigu ĉiujn antaŭajn Skribaĵojn ; se oni ne obeus, pli gravaj malfeliĉoj estus okazontaj.

Multaj Pallar-surskriboj malaperis kaj ankaŭ multaj lunaj kalendaroj.

Geometria Inkaa Skribo

En la 11-a jarcento, Manco Capac, la unua ĉefo de la « quichua » (kiŝua) tribo Inkaa, venis el la lago Titicaca. Li nomis sin Filo de Suno kaj arigis la kiŝu-lingvajn tribojn sur la bordoj de la lago Cuzco (nomo, kiu signifas : la ombiliko de la Tero).

En la 15-a jarcento la Hispanoj invadis Peruon ; Pizarro kaj liaj soldatoj iĝis famaj pri siaj



teruraĵoj. Tiam la Inkaa Imperio etendiĝis sur la aktualaj Ekvatoro, Peruo kaj parto de Bolivio. Tiu Imperio estis forte organizita ; ĝia suna religio, ĝia kompleksa administracia hierarkio, ĝia ekonomika direktisma sistemo, rigore planizita, konsiderigis ĝin kiel perfektan socialistan realigon.

La Hispanaj okupantoj notis la neekziston de Skribo (simila al la Eŭropa). Ili ne sciis vidi kaj kompreni la antaŭ-alfabetajn signojn, kiujn la Inkaoj sciis legi. Tamen la kronikistoj signalis la « quipus » kaj la « quilcas » (la kipuoj estas ŝnuretoj kun nodoj, kiuj servis por kalkuli kaj esprimi ideojn — la kilkaoj estis pentraĵoj, signoj kaj koloraj figuroj, kiuj raportis pri rakontoj, leĝoj, testamentoj kaj historiaj eventoj).

La tunikoj de la Inkaoj montras kolorajn, geometriajn, diversajn desegnojn, kiuj ripetiĝas. Pentraĵoj (faritaj post la hispana konkero) reprezentas inkaajn princinojn ; iliaj vestoj havas la samajn geometriajn desegnojn.

Sed estas precipe la ritaj vazoj — la Keroj — kiuj igis ebla la deĉifradon de la Inkaa Skribo. La Keroj estas lignaj vazoj, kiujn la Inkaaj Princoj kaj iliaj idoj uzis por siaj drinkadoj. La posteuloj de la imperiestraj familioj, kiuj ilin heredis, konsideris ilin kiel sanktan posedaĵon, kiun ili rifuzis vendi. La Keroj, fabrikitaj nur en Cuzco, estis unikaj (kelkfoje oni faris du similajn Kerojn por honori la gaston, kiun oni akceptis en sian hejmon). Sur la ligna vazo, oni markis la liniojn de la desegno, kiun, unue, oni gravuris kaj poste lakis per gumo aŭ rezino, ĉiu Kero havis sian propran desegnon, kiu, per unu, du, aŭ tri linioj, elvokis personon, templon, palacon, historian eventon, kiun oni ne devis forgesi.

Estas tiuj historiaj eventoj, kiujn la Inkao Pachacuti enskribigis sur lignaj tabuloj kaj sur la ritaj vazoj. Dum la konkero, la Hispanoj kolektis la lignajn tabulojn, kiuj grandparte malaperis. La Keroj postvivis kaj dum la sekvantaj jarcentoj, la Peruanoj daŭre fabrikis Kerojn kun la samaj primitivaj desegnoj, senĉese ripetante la Inkaajn historiajn eventojn.

Tiuj historiaj scenoj estas akompanataj de geometriaj signoj, kiuj rolis kiel la egiptaj hieroglifoj. Komparante scenojn kaj signojn oni sukcesis malkovri, plurkolore esprimitajn, la nomojn de la dioj, de la reĝoj, de la princino, de la ĉefaj urboj. Sur la Keroj — kiel en prahistoriaj grotoj — triangulo simbolas la femalan sekson dum birdo aŭ plumo montras la masklan sekson. Kiam tiuj signoj akompanas floran motivon, ili simbolas fekundecan kulton.

Cetere, malgraŭ la ĉeesto de la Kristanaj Hispanoj, la Peruanoj neniam reprezentis la kristanan krucon. Ili daŭre gravuris sur siaj Keroj la seksajn kaj sunajn simbolojn. Tio pruvas, ke, malgraŭ la hispana okupado, la indiĝenoj daŭre kultis siajn Inkaajn diojn.

La nombro 4 (kiun oni retrovas en pluraj mitoj) estis simbola cifero de granda graveco, kaj donis sian nomon al la Imperio : Tihuantinsuyo : la regno super la 4 regionoj de la Inkaa Mondo (4 = tihua).

Ĉiu signo estas entenata en malgranda kvadrato aŭ rektangulo ; Vario ĉe la koloro, ĉe la desegno esprimas precizan ideon ; EKZ : jen la suno kun siaj du oblikve kruciĝantaj radioj ; aldonitaj detaloj montras la matenon, la tagmezon, la vesperon, la solsticon, la sezonojn. En tiuj signoj, la bluo estas por la pluvo, la bruno por la sekeco, la nigro por la ombro. La ruĝo, la blanko, la flavo estas la tri ĉielaj lumoj de Suno, Luno kaj de Steloj.

La ruĝo ĉiam esprimas tion, kio plej gravas.

La vasta mondo estas ruĝa rektangulo kun, en la anguloj, kvar malgrandaj duoncikloj, kiuj simbolas la kvar angulojn de Ĉielo kaj Tero. La ĉefurbo estas ruĝa rektangulo kun, sur la lateroj, kvar malgrandaj kvadratoj, kiuj reprezentas la kvar ĉefpunktojn. Por la reĝo, sur ruĝa fono, estas la kvar plumoj de la sankta birdo, kiuj kruciĝas. Kiam la plumoj ne estas nigraj, temas pri princo aŭ nobelo. Unu nura plumo estas por unu brava militisto, du plumoj montras pluralon.

La signo, kiu reprezentas la domon multe similas la samsignifan egiptan hieroglifon. Sur la Keroj oni facile rekonis la palacojn la templojn, la urbojn, la tombejojn.

Unu el tiuj lignaj vazoj estas Tempa Kero : 10 signoj sur unu linio montras la Inkaan semajnon de 10 tagoj ; 3 linioj formas unu monaton. En la mezo, unu linio de 12 signoj korespondas al la 12 monatoj de la jaro.

La Keroj dediĉitaj al la religia hierarkio tute diferencas de la reĝaj. Ili ne entenas bildigitajn scenojn ; ili enhavas nur signojn asociitajn al la astraj signoj : diversaj koloroj precizigas la rangon de la menciitaj religiaj eminentuloj.

La studo de la Keroj malkovrigis kiamaniere tiuj signoj evoluis, transformiĝis, grupiĝis, simpliĝis.

Unu Kero estas dediĉita al la Inkao Pachacuti. Tiu Imperiestro estis unu el la grandaj leĝodonantoj apud Solon, Likurgo, kaj Hammurabi. Pachacuti pensis, interalie, ke ŝtelo, fare de malsata homo, estas kulpo, pri kiu kulpas, ne la ŝtelanto, sed la instancoj, kiuj ne antaŭevitis tiun bedaŭrindan agon.

La nomo Pachacuti kvalifikas la Mondon (Tero kaj Ĉielo), la Tempo, kaj pli precize, ciklon de 500 jaroj. Pachacuti estas « Tiu, kiu revenas kaj kiu ŝanĝas la Mondon ». Ĉu la Inkaaj Pastroj opiniis, ke 500 jaroj estis necesaj por malaperigi la malfeliĉojn, kiujn Pizarro alportis ?

Sur la Kero dediĉita al Pachacuti estas neniu historia sceno. Estas nur tri linioj da supermetitaj signoj, kiuj memorigas la grandecon de Pachacuti kaj la esperon de reiro al la perdita feliĉo.

Dank'al tiu freŝdata malkovro de la Inkaa Skribo, oni baldaŭ pli bone povos studi la historion de tiu granda Imperio.

El. Archeologia.

NI RIGARDU la ĈIELON

Nuntempe, la urbanoj malofte rigardas la ĉielon. Vespere ili rigardas la televidon kaj kiam ili eliras la domon, la lumoj de la urbo kaj la polucio de la aero malebligas ilin vidi la stelojn.

Do ni devas profiti la libertempon, precipe en tiu regiono kie la aero estas tre pura, por admiri la noktan spektaklon, kiun la naturo donas al ni. Plie tiu admirinda spektaklo estas tute senpaga.

Kion ni povas vidi en la ĉielo : la stelojn, la satelitojn de la tero, inter ili la luno kaj kelkajn planedojn.

Ĉiuj konas la lunon pli aŭ malpli bone. Ĉiu semajno la luno ŝanĝiĝas. Unue nevidebla, la luna disko pligrandiĝas de tago al tago ĝis iĝi ronda kaj poste malaperas iom post iom. La ciklo rekomencas ĉiujn 29 tagojn kaj duono. Sur la luno oni vidas makulojn. Oni nomas ilin marojn kvankam ili neniam enhavis akvon. Kiam oni uzas binoklon aŭ lornon, oni povas vidi multajn kraterojn kaj montojn precipe dum la unua kaj lasta kvaronlunoj. Dum tiuj fazoj la sunlumo faras ombrojn, kiuj reliefigas la grundon.

Kvar planedoj estas videblaj sen aparato : Venuso, Marso, Jupitero kaj Saturno. Oni rekonas ilin inter la steloj ĉar ili ne trembrilas.

Venuso estas la plej brila punkto en la ĉielo krom la suno kaj la luno. Ĝi estas videbla ĉu vespere post la sunsubiro — estas la « vespera stelo » — ĉu matene antaŭ la tagiĝo — estas la « matena stelo ». Oni nomas ĝin ankaŭ la stelo de la ŝafisto. Sed ĝi ne estas stelo sed planedo. Per lorno oni povas vidi fazojn kiel montras la luno. Sed eĉ grandaj teleskopoj ne montras pli.

Marso estas ruĝa disko bone rekonebla. Per lorno oni povas vidi blankajn partojn ĉe la polusoj. La du satelitoj de Marso ne estas videblaj ĉar ili estas tro malgrandaj. La pli granda estas nur 22 km. longa.

Jupitero estas la plej granda planedo el nia sunsistemo. Ĝi aperas blanka. Per bona lorno oni vidas grizajn liniojn kaj ruĝan makulon sur ĝi. Jupitero havas 13 satelitojn. Kvar el ili estas videblaj per simpla binoklo. Ili rondiras tre rapide ĉirkaŭ la planedo. Ekzemple la satelito Io bezonas nur 4 horojn por preterpas malantaŭ Jupitero.

Saturno montras la plej strangan spektaklon de nia sunsistemo. Ĝi havas ringojn. Sed oni devas pligrandigi almenaŭ 30 foje por vidi ilin ĉar Saturno estas je pli ol mil milionoj da km de ni.

Ankaŭ artefaritaj satelitoj estas videbla. Oni rekonas ilin ĉar ili rapide trairas la ĉielon.

La nomoj de la steloj kaj de la konstelacioj devenas de la araboj kaj de la persoj. Tial ili havas strangajn nomojn. Jam de longtempe la homoj kutimis doni nomojn al la figuroj desegnitaj sur la ĉielo de la steloj por pli facile retrovi ilin.

Por niaj prauloj la steloj estis dioj aŭ duondioj kaj multaj nomoj devenas de la mitologio ĉu greka, ĉu araba, ĉu persa.


La plej malnova katalogo retrovita datumas de la IIIa jarcento antaŭ Kristo kaj tiujn nomojn oni konservis ĝis nun.

Sed nuntempe la astronomoj uzas matematikajn simbolojn por montri la stelojn. La plej brilaj ricevis grekajn literojn, la aliaj romaniajn literojn kaj nombrojn.

Kiamaniere rekoni kaj retrovi la konstelaciojn en la ĉielo ?

Unue vi devas scii kie estas la nordo ĉar en la norda direkto estas konstelacioj videblaj dum la tuta jaro. Ili rondiras ĉirkaŭ la polusa stelo.

Do rigardante norden ni facile rekonos la « grandan ursinon ».



Laŭ la romanioj estas ĉaro tirita de 3 ĉevaloj. Laŭ la araboj la 4 steloj reprezentas ĉerkon kaj la 3 aliaj estas plorantaj virinoj kiuj sekvas la ĉerkon. Sed laŭ la grekoj temas pri la princino Kalisto post ŝia transformo en ursinon fare de la edzino de Jupitero.

Kaj la nomoj de tiuj steloj estas ankoraŭ pli strangaj :

alpha nomiĝas DUBHE kiu signifas urso ;

beta nomiĝas MERAK kiu signifas kokso ;

gamma nomiĝas PHEKDA kiu signifas femuro ;

delta nomiĝas MEGREZ kiu signifas komenco de la vosto ;

epsilon nomiĝas ALIOTH kiu signifas vosto ;

eta nomiĝas BENETNASH kiu signifas ploranta virino ;

dzeta nomiĝas MIZAR.

Se vi bone rigardas tiun lastan stelon, vi vidos ne unu sed du punktojn. La dua nomiĝas ALCOR. Uzante lornon vi eĉ vidos tri stelojn kaj laŭ la analizo de la lumo la astronomoj asertas ke estas sep steloj. Sed la kvar aliaj ne estas videblaj.


ALCOR kaj MIZAR permesas al ni kompari la brilecon de la steloj. Oni nomas magnitudo la brilecon de la steloj. MIZAR havas magnitudon de 2 kaj ALCOR havas magnitudon de 4. Kion signifas tio ? Denove stranga kaj malnova kutimo : ju pli la nombro estas granda des malpli la stelo estas brila. Kaj kiam oni aldonas unu, tio signifas ke la stelo estas 2,5 foje malpli brila.

Do ALCOR estas 6,25 foje malpli brila ol MIZAR. La stelo VEGA havas magnitudon de nulo, sed SIRIUS havas magnitudon de — 2 kaj la plenluno havas magnitudon de — 13.

Kompreneble nun la sciencistoj bezonas sciencan unuon. Do ili faris sciencan difinon de la magnitudo nulo. Por la interesantoj oni difinas la magnitudon nulo kiel la lumo ricevita de punkto de lumintenso de unu kandelo vidita je distanco de unu kilometro.

Do revenante al nia « granda ursino », se ni plilongigas la distancon inter la du lastaj steloj de kvinfojoj ni trovas stelon tute solan en tiu parto de la ĉielo. Estas la polusa stelo, kiu estas la lasta stelo de la konstelacio de la « malgranda ursino ».

Simetrie al la « granda ursino » ni trovas stelojn kiuj formas la literon M aŭ W. Estas Kasiopeo. Se oni plilongigas la linion inter la polusa stelo kaj Kasiopeo de sama distanco oni malkovras kvadrato : estas « Pegazo ».



Sub Kasiopeo, Pegazo plilongiĝas per linio da steloj kiuj formas la konstelacion de « Andromedo ». En tiu konstelacio troviĝas la plej proksima galaksio videbla sen aparato.

Tiuj konstelacioj ĉiam videblaj permesas retrovi la aliajn.

Ankaŭ la aliaj konstelacioj rondiras ĉirkaŭ la polusa stelo. Sed ĉar ili estas pli malproksimaj de tiu stelo, ili subiras la horizonton. Do oni vidas nur parton ĉiun sezonon.

Nun ni parolos pri la someraj steloj nun videblaj.

Sekvante la kurbon de la granda ursina vosto ni vidas okcidenten tre brilan stelon de magnitudo nulo. Estas ARCTURUS en la konstelacio de « la bovisto».

Apude oni povas vidi cirklon da steloj : estas « la boreala krono ».

Apude estas la konstelacio de « herkulo » en formo de kvadrato.

En la konstelacio de la bovisto estas duobla stelo bone videbla per binoklo.



En la konstelacio de herkulo troviĝas amaso da steloj videbla per binoklo kiel blanka makulo.

Rigardante al la zenito ni vidas tre brilan stelon de magnitudo nulo. Tio estas VEGA en la konstelacio de la « liro ». Inter VEGA kaj la horizonto alia brila stelo estas ALTAIR en la konstelacio de la « aglo ».







Maldekstre de VEGA alia brila stelo en konstelacio en formo de kruco : estas DENEB.

VEGA, DENEB kaj ALTAIR formas la someran triangulon.

Kaj pli suden ĉe la horizonto estas bela ruĝa stelo. Estas ANTARES en la konstelacio de la skorpio.

Sed vintre la ĉielo estas ankoraŭ pli admirinda.

Falsteloj estas rapide malaperintaj lumoj. Estas fakte polvo falante sur la tero kiu konsumiĝas tra la atmosfero. Ekzistas nuboj da polvo en la ĉielo kaj kiam la tero trapasas ilin oni vidas pluvon da falsteloj. Tio okazas ĉiujare precipe dum aŭgusto.

A. MASCLET.

Pri la Olivarbo

Laŭ la Biblia legendo, kiam la kolombo revenis de sia dua forflugo el la arkeo, en sia beko ĝi tenis freŝan frondeton de olivarbo. Tiamaniere, Noa, la Patriarko eksciis, ke la diluvakvoj jam refluis sur la tero, kaj tiel tiu arbo, la olivarbo, pri kiu Duhamel skribis ke, « kie ĝi abdikas, tie finiĝas la Mediteraneo », ĝuis la privilegion esti la unua vegetaĵo, nome citata en la historio de nia mondo Okcidenta.

Same kiel nia lingvo Esperanto, la olivarbo simbolas pacon kaj esperon : estas do agrable iom skribi pri ĝi. Pri ties kultivado ekzistas multaj libroj. Sed ĉi-tie ni flanken lasos agronomion. Ankaŭ kuirarton kaj kuracarton ni ne tuŝos, resendante la leganton al la fama Provenca kuristo J.-B. Reboul por la unua, kaj la fakuloj, kiel Mességué aŭ Bourdelon, por la dua.

Kio do restas ?

Nia intenco estas, unue iom esplori la apartan gravecon de tiu arbo en la Mediteraneaj civilizoj, ĝenerale, kaj pli precize en Provenco. Tiam, konstatinte ĝian bedaŭrindan regreson, pludiri kial ni tamen rajtas, esperi daŭrigon kaj renoviĝon de ĝia ĉeesto apud ni.

★

De multaj arboj oni ja povus laŭdi la meritojn ; sed estas fakto, ke la olivarbo staras iel aparte en sia rilato kun la homoj . ĝia nura nomo ĉiam vekis profundan resonon. De kie tiu mistero ? Certe ne hazarde niaj prapatroj atribuis al ĝi tiun econ, kiun ni nomu « sakrala ». Sakrala, ne sankta. Tie-ĉi ni sekvos G. Waringhien. Studante la sentojn de niaj prauloj pri la kreopovoj de la Naturo, li opinias, ke la vorto sankta ne taŭgas, ĉar « ĝi estas tro ŝarĝita », de la kulturo judkristana, « je signifo morala (1) ». Li do proponas tiun neologismo : « sakrala sakraleco », por priskribi ekstermoralan nocion. Kiu el ni, eĉ modernuloj, ekvidante iun tian koloson, ie apud la Mediteraneo, ĉu apud Maratono aŭ Delfo en Greklando, ĉu en Toskanio sur la molaj montetoj, aŭ sur la aspraj ebenoj de Nord-Afriko, aŭ ci-tie sur la franca Riviero, ne sentis sin « neklarigeble tuŝata en la animprofundo ? kompleksa sento, miksata je allogo, miro, admiro, timo »... amo... ?

Mistera estas tiu arbo, kiu sola kapablas ĉerpi trezoron, la oleon, kvazaŭ alkemie, el la ŝajne sterila sino de la tero ;

Impresa, por ni kadukuloj, ĉar ĝi aspektas kvazaŭeterna : ĝin la morto ne kapablas trafi, se ne homo aŭ akcidento intervenas ; eĉ ŝajne morta, ekzemple post la terura frosto de Kandelfesto 1956, ĝi posedas la mirindan povon, bele priskribitan de Marie Mauron, sin postvivi per elŝpruco de sennombraj idoj ;

Bela, fine : la trunkoj node potencaj, la brancaro sinue leĝera, la arĝenta lumo de la foliaro sorĉas eĉ la plej simplaj homojn.

Des pli profunde la artistojn. « Rigardu », diris Renoir al siaj disĉiploj, « rigardu la lumon en la olivarboj ; ĝi brilas kvazaŭ diamanto ». Same, la arbo fascinis Van Gogh : « Ah ! mia kara Theo », li skribis al sia frato, « se vi nur vidus la olivarbojn ! la foliaro maljunarĝenta kaj arĝenta, kiu verdiĝas kontraŭ la bluo. Kaj la oranĝeta grundo plugita... La flustrado de olivarbejo enhavas ian ion, tre intiman, senlime maljunan. Tro bela, por ke mi kuraĝu ĝin pentri. »

Ĉu mirinde do ke tiu prestiĝa arbo, antikva kunulo de la homaro, ĉiam staris centre de la religioj kaj kulturoj de nia Mediteraneo ? Ĉi-tie ni devas pluki el neelĉerpebla amaso da faktoj, kaj nepre devas elekti.

En la Korano, Mahometo deklaras : « Dio estas lumo ». Kaj li aldonas : « Kvazaŭ lampo, lumigita dank'al la benita olivarbo (2). » Komente : la simbolaro de la homoj ĉiam respegulas la fundamentajn zorgojn. Olivarbo, lumo. Ni, homoj de la jarcento de l'elektro, ne forgesu ke, kiam mallumo estis teruro, la olivoleo nutris ne nur la korpojn, sed ankaŭ la milionojn da lampoj de la noktoj mediteraneaj, ekde la plej rudimenta praa lumigilo, ĝis « lou caleŭ » de niaj avoj. Antikva miljara ŝuldo !

El la Biblio, kie la arbo tre ofte ĉeestas, ni ĉerpos nur kelkajn ekzemplojn. En la Malnova Testamento, en la libro de la Juĝistoj, la arboj petis de la olivarbo : « Vi estus nia reĝo, super ni ! (3). » La profeto Zaĥarja vidas sonĝe olivarbon, kiu laŭŝajne antaŭsimbolas la venontan Mesion (4).

Efektive en la Nova Testamento, Jesuo mem meditas sur la Monto Olivarba ; poste, li venas al loko, rakontas Mateo (5), nomata Getsemane. Ĉiu klera homo, kristano aŭ ne, nome konas tiun ĝardenon, kie komenciĝis la Pasiono. Sed eble nemultaj scias, ke Getsemane signifas « la olivpremilon », « la oleomuelilon ». Provenclingve, « lou destré ». Tie, la Eternulo ekmuelis Jesuon kvazaŭ olivon, kaj la simbolo, de la olivo esprimata, estas oferemo sindona, por la bono de la homaro.

Transirante de la religiaj libroj al la civilizoj Helena kaj Romania, ni renkontas nian arbon ĉiupaŝe. La vazoj de Atiko kaj Etruskio, la draĥmoj helenaj kaj la romanaj sestercoj, la metopoj de la temploj kaj la muroj de Pompejo, — ĉio atestas la gravecon de ĝia rolo en la ĉiutaga vivo, artoj, legendoj, kaj mitologio.

En la ĉiutaga vivo, ne enirante la kuirejon, ni mencios :

— ke la elegantulinoj kovris sian vizaĝon per maskoj el pasto de verdaj olivoj kaj hakitaj olivfolioj ;

— ke la baniĝantoj, kaj ĉefe la atletoj en la palestro, sin ŝmiris abunde per oleo ; estas hodiaŭ videblaj en la muzeoj la iloj el bronzo per kiuj, post la streboj, la junuloj skrapis la miksaĵon de oleo, ŝvito kaj polvo desur siaj membroj ;

— ke la helenoj konfidis la kultivadon de la arbo nur al virgulinoj, aŭ « puraj » homoj ; bone sciante, ke, se malpurulino plantus la stumpeton, ŝi neniam gravediĝus, kaj la arbeto sekiĝus ;

— ke la Senatanoj en Romo sidis kronitaj per olivfrondeto, kaj punis per ekzilo la profanantojn de la arboj : nia registaro inspiriĝu de tiu severeco kontraŭ la fuŝkontruistoj kaj fidetruantoj de nia Riviero...

Heraklo, la fama heroo, svingis olivarban klabon. Simbolo : venko, forto, potenco. Li plantis la olivarbon en Olimpio, kie paceme renkontiĝis la Helenoj. Simbolo : paco.

La plej fama apero de la olivarbo, en tiu legenda mondo estis je la fondo de nia lasta kongresa urbo. Ateno. Atena kaj Pozidono vete postulis la protektadon de la nova urbo. Zeŭso dekretis, ke ĝin ricevos la kreonto de la plej bela estaĵo. Pozidono furioze batis la rokon per sia tridento : ekbaŭmis la ĉevalo. Atena vice frapis la teron per sia lanco : elŝprucis olivarbo giganta, fruktoriĉa, emblemo de abundo kaj paco. Tiel Atena venkis. Tiun olivarbon la kongresanoj povis vidi lastsomere vizitante la Akropolon. Ĝi ankoraŭ staras tie, apud la templo Erektejon. Ĉu la sama ? Kial ne ? Detruita de la Barbaroj antaŭ dekkvin jarcentoj, ĝi rekreskis dum unu nokto ! Ni ja diris, ke olivarbo ne mortas.

Ĉar Odiseo estis protektata de Atena, la ombro de ŝia arbo ŝvebas sur la Odiseado. Odiseo uzas palison olivarban por krevigi la okulon de la Ciklopo Polifemo. Poste, reveninte en Itakon, li devas sin rekonigi al sia edzino Penelopa ; kaj jen okazas unu inter la plej poeziaj scenoj de la epopeo. Li rakontas al ŝi ion konatan de nur

---

(1) « Ni kaj Ĝi », Stafeto 1972, p. 20-21.

(2) Surao XXIVa, 35.
(3) Juĝ. IX. 3.
(4) Z. IV. 1-14.
(5) Mat. XXVI, 36.

li kaj ŝi, nome, kiel antaŭ jaroj li faris la geedzan liton. Li estis unue konstruinta la ĉambron ĉirkaŭ bela dika olivarbo ; poste, dehakante la supron, li konservis la vivajn stumpon kaj radikojn, kiuj tiel iĝis la potenca soklo de la lito. « Tiam Penelopa ektremis », diras Homero, « ĉar ŝi rekonis la signojn... ».

Ni venu nun al nia lando.

Ĉu la olivarbo estas indiĝena ? Ĉu ĝi venis de la Oriento ? Indiĝena, diras Strabono. Ne, respondas Plinio : la Masaljanoj alportis ĝin en Gallion antaŭ ol oni konis ĝin en Italio. Jes, kaj ne, verŝajne. La olivarbo sovaĝa, la oleastro, aperas en la Provenca paleontologio. Sed oni rajtas revi, ke ĉu la Fenicoj, ĉu la ekzilitoj de Foceo, alportis bonajn speciojn al Masalja, -prezon de la gastamemo. Certe estas, ke kun la Romianoj la arbo elvenas el la nebuloj de la fabelo : ili instruis la indiĝenojn pri la greftado kaj plibonigo, kaj de tiam la olivarbo kaj la lando ligiĝis nedisigeble.

Kiam Klodvigo estis konsekrata reĝo en Remso. Sankta Remi sanktoleis lin per la produkto de la arboj de sia bieno en Saint-Rémi de Provence. Ĉiuj francaj reĝoj ŝuldis sian reĝecon al la olivoleo de la sankta Ampolo.

En Provenco mem, la arbo kreis kaj plutenis la ekonomian ekvilibron de la kampara civilizo, de la antikvaj tempoj ĝis la fundamentaj ŝanĝiĝoj de nia jarcento. Ĝi ankoraŭ regis la junaĝon de Marie Mauron, en Maussane, kune kun la vito, la morusarbo kaj la ŝafoj. En ŝia ĉarma libro « Quouro la vido ero la vido », « Kiam la vivo estis la vivo », ŝi rememoras, kiel la arbo ritmis la sezonojn, kun sinsekvo de festaj kunvenoj. Februare, oni delikate pritondis kaj stucis la frondaron. La florado anoncis Majon. Post la somera gravediĝa dormeto, Novembro signifis la rikolton, kaj Decembro la oleopremadon, kaj la revenon de la likva trezoro al la bieno. Kiam venis Kristnasko, la riĉa noveleo malavare surfluis la kardojn kaj celeriojn de la « granda vespermanĝo », kun pipro kaj anĉovoj ; vespere, du infanetoj alportis la olivarban « cacho-fiô », la pezan fortikan stipon. Silentis ĉiuj. La avo verŝis glasplenon da vino sur ĝin, redirante la ritajn kvazaŭmagiajn vortojn : Que Nostre Sègne nous alègre... ktp. ». « Nia Sinjoro ĝojigu nin ». Per tiu rito, tre amplekse transirante la kristanan kredon, kaj reatingante la sakralajn profundojn, la homo asociis sian arban amikon al siaj praaj timoj, zorgoj, kaj aspiroj.

La lingvo mem respegulas tiun intiman inserton de la arbo en la substancon mem de la homo. La proverbaj esprimoj elokventas : Prodiganto disipas sian havaĵon : « Escampa soun ôli », li malŝparas sian oleon. Orgojlulo fanfaronas : « Voù estre l'ôli sus tout », li volas estis la oleo super ĉio. Kaj la plej bela laŭdo estas : « Aco's l'ôli ! » Tio estas la plejbono, la « kremo », la elito, la plej fajna de la fajno !

Estus dezirinde, iom detale montri, kiom da atento, ĉu amema, ĉu admirema, eminentaj homoj kaj verkistoj dediĉis al nia arbo. Mankas la spaco, por tion fari. Nur el la franca literaturo estus kolektebla granda antologio, kiu certe multe ampleksiĝus, se ni transirus la landlimojn. De Vergilio ĝis Malraux, trans Omar Khayyam, Francisko el Asizi, la Arabaj Noktoj, Dante, kaj Goethe, kaj tiom da aliaj, kian prestiĝan libron, kun la ilustrajoj, oni povus kompili !

La Sudfrancaj verkistoj, vivante apud la arbo, pli vigle sentis ĝian etoson. La olivarbo nedisigeble elvokas la suferojn de la tenera Mireja, kaj Mistral honorigis ĝin per la titolo de sia lasta lirika poemaro, « Lis Oulivado ». Aubanel priskribis, kion la arbo ŝuldas al la suno kaj maro. Roumaville laŭdis la krudan sukan riĉon de terpoto da « piĉolinoj ». Giono ne nur dediĉis majstrajn paĝojn al la olivo, sed mem posedis kaj flegis olivarbejon sur la deklivoj de la Monto Ora, apud Manosque. Sed tie kaj tie ni ne povas halti.

Ni tamen haltu ĉe iu, kiu kare amis la olivarbon, kaj penetre sentis ĝian apartan econ : Henriko Bosco. Li antaŭnelonge transpaŝis la misteran limon en sia Roza Domo en Cimiez, kaj nun kuŝas apud Albert Camus en Lourmarin. Jen omaĝe, kelkaj linioj. En 1950, li rakontis tiele :

> « Antaŭ tri jaroj, mi aĉetis bieneton en Lourmarin. De kvarono de jarcento, neniu tie donis eĉ unu pioĉbaton... Tamen, mi nombris inter la rokoj sesdekon da maljunaj olivarboj. Sekaj, kriplaj, sunmanĝitaj, ventotaŭzitaj, malsataj, ili senfruktiĝis. Vere, oleastroj !
>
> Tamen, mi ne scias kial, mi satis tiujn ulojn. En la forlaso, ili konservis ian konfidon. Ili aspektis kiel tre maljunaj homoj. Certe, io homa eliĝis el ili, kvazaŭ la espero obstina de antikva kampara raso. Ili atendis.
>
> Arboj de pacienco, arboj de kredo, vegetaj estuloj religie ligitaj al sia roko malfekunda, respektendaj vivantoj, — de tiu roko la lastaj, la ververaj posedantoj.
>
> La homo, tie, estis abdikinta. Ili, restis tie. Kompaton ili ne atendis. Ili eble esperadis iom da amo, aŭ, ankoraŭ pli simple, iom da justeco.
>
> Tial, subite, mi ilin ekamis ». (6).

Bosco aldonas, ke tion li skribis pro tiu amo. Pacience, li flegis la arbojn. Post du jaroj, duono da ili jam fruktis, kaj li ekgustis sian oleon. Li konkludis : « La pakto de la renoviĝo, farita kun la homo, estis obeita. »

(daŭrigota).

---

(6) Aperis en Broŝuro eldonita de la Dua Provenca Foiro de l'Olivarbo Draguignan, Julio 1955.

KIU POVAS HELPI ?

Okazas, ke al la Kulturdomo venas eksterlandanoj por lerni Esperanton, sed kiuj parolas nur sian nacian lingvon. Pri multaj lingvoj, ni disponas neniun lernolibron, sekve ni renkontas multajn malfacilaĵojn por starigi utilan kontakton inter tiuj estontaj samideanoj kaj niaj instruistoj.

La posedado de la diverslandaj « ŝlosiloj » (araba persa, hebrea, ktp. ktp.) estus por la Kulturdomo altvalora helpilo ; ĉu kelkaj el la legantoj de K.K. kiuj posedas de longe elĉerpitajn ŝlosilojn bonvolos helpi, sendante ilin al la Kulturdomo ? Jam anticipe, ili ricevu nian plej elkoran dankon.

K.K.

LA SPECIALA TRAJNO MALAPERIS

Estas la 3-a de junio 1890. S-ro Bland, komisaro en la fervoja stacio de Liverpool estas sciigita, ke Sro Karatal deziras prezenti al li peton. S-ro Karatal, mezaĝa, bruna, iom dorskurba, ĵus alvenis el Centra Ameriko ; li estas akompanata de Sro Gomez ; tiu ĉi fortstatura, verŝajne sudamerikana, portas, ĉe sia maldekstra mano, tekon el nigra ledo, ligita al lia manartiko per leda rimeno.

Sro Karatal eksplikas : li maltrafis la ekspreson de Liverpool por Londono kaj Parizo ; aferoj la plej gravaj atendas lin en Parizo ; li ne povas atendi la sekvontan omnibuson, kiu trafos Londonon tro malfrue ; li nepre bezonas specialan trajnon (kiun tiam, oni facile havigis en la grand-komercaj urboj) ; ne gravas la kosto, li pagos tion, kion oni postulos de li.

S-ro Bland kaj lia subulo Sro Hood aranĝas la aferon en 5 minutoj. La speciala trajno konsistas el la lokomotivo kondukita de J. Slater la mekanikisto kaj de W. Smith la hejtisto, de du vagonoj kaj unu ŝarĝvagono ; la trajno-ĉefo estas S-ro M. Ferson.

S-ro Karatal kaj lia kunulo instaliĝas ; la trajno foriras je la 4-a horo kaj 32 minutoj ; ĝi ne haltos antaŭ ĝia alveno en Manchester.

Je la 6-a kaj kvarono Manchester rimarkigas, ke la Speciala Trajno ankoraŭ ne alvenis ; plie la omnibuso, kiu ĵus alvenis indikas, ke ĝi tute ne vidis la ekspreson.

Sro Bland klopodas ĉe la interaj stacioj ; konkludoj : la Trajno estas pasinta en St Helens je la 4-a kaj 52 m. ; en Collins Green je la 5-a ; en Newton je la 5-a kaj 10 m. ; en Kenyon je la 5-a kaj 20 m. ; sed Barton Moss, la sekvanta stacio, tute ne vidis, la trajnon.

Sro Bland kaj Sro Hood interkonsentas ; en 30 jaroj da komuna laboro, ili neniam vidis tian aferon.

Kie estas la Trajno ? Kio okazis ?

— la trajno ne povis vojerari ĉar ne ekzistas trakforko ;

— eble la trajno eltrakiĝis ? sed la dungitoj de la omnibuso estas nepre certaj : ili vidis nenian akcidenton.

Sro Bland telefonas al la staciestro de Kenyon por ke li, per lokomotivo, laŭiru la relvojon de Kenyon ĝis Barton Moss.

Duonhoron pli poste Kenyon telefonas : oni nenion trovis !

Kiamaniere lokomotivo, tendro, du vagonoj, unu ŝarĝvagono estis povintaj malaperi ?

Tamen, iom pli poste, alia depeŝo anoncas, ke oni ĵus malkovris la kadavron de la mekanikisto Slater, meze de uleksoj, je 4 km de Kenyon ; vundoj ĉe lia kapo estis okazigintaj lian morton ; ĉirkaŭe oni nenion trovis.

La tiamaj ĵurnaloj malmute parolas pri tiu stranga afero ; ili konsideras ĝin kiel ruzan artifikaĵon, kiu celas kaŝi la financajn kaj politikajn skandalojn, ĵus malkovritajn en Londono kaj Parizo.

Oni plej zorge ekzamenis la ĉirkaŭaĵojn de la relvojo ; en tiu regiono ekzistas 7 minejoj ; tri el ili ankoraŭ funkcias kaj etŝpuraj trakoj, proksimume 4 km-longaj, permesas al iliaj vagonetoj atingi la ĉefan relvojon, kiu havas normalan trakon : la relvojo de la minejo Carnstoch finalvenas al karbo-amaso ; tiu de Big-Ben estas blokita per vagonoj de eco ; en la minejo Persistado la trafiko estas granda kaj la cento da laboristoj nenion vidis.

La kvar aliaj minejoj ne plu estas uzataj ; por eviti akcidentojn oni ŝtopis la putojn kaj oni forprenis parton de la reloj.

Certe oni enketis pri la morto de Slater ; oni proponis rekompencon oni eĉ certigis malkondamnon okaze de murdo. Sed rezultis nenio.

Subite neatendita evento okasas : Sino Ferson ricevas leteron de sia edzo ; ŝi certigas, ke estas lia skribaĵo ; tiu letero, sendita el Nov-Jorko la 5-an de julio 1890, entenas 20 biletojn de 5 dolaroj kaj diras :

Mia kara edzino.

Mi multe pripensis ; mi ne povas forlasi vin kaj mian karan etan Lilian ; helpe de la mono, kiun mi almetas, ambaŭ venu en Nov-Jorkon ; atendu min en la pensiono Jonhson ; ĝi estas fronte al la mara stacidomo ; mi skibos tien por klarigi kiamaniere ni povos renkontiĝi. En tiu momento mi estas tre malfeliĉa kaj mi havas multajn malfacilaĵojn.

Sino Ferson kaj Lilia foriris al Nov-Jorko kaj instaliĝis en la pensiono Jonhson ; ili restadis ĉi tie 3 semajnojn ; sed nenion ricevis de S-ro Ferson ; li ne skribis nek montriĝis. Ambaŭ revenis al Liverpool.

Pri S-ro Karatal oni eksciis, ke li estis fama en la financa kaj politika medioj ; sed la alilandaj policoj restis mutaj ; Gomez estis lia korpo-gardisto.

Dum ok jaroj oni pli-malpli forgesis la aferon. Sed, en 1898, la ĉefaj ĵurnaloj ricevis leteron de Henriko Lernak.

Tiu ĉi estis ĵus mort-kondamnita pro murdo de Marsejla komercisto. Lia letero estis ĉantaĝo, jen ĝi.

Al S-ro de ..., al Generalo ... al vi Barono ...

Mi postulas komutadon de mia morto-kondamno en kelkjaran malliberigon. Se ne, mi liveros viajn nomojn kaj vian partoprenon en la afero de la Speciala Trajno. Mi povas jam ĉi tie refreŝigi viajn memoraĵojn :

En 1898, monstra financa skandalo eksplodis en granda eŭropa ĉefurbo. S-ro Karatal posedis plej gravajn dokumentojn, kiujn li devis alporti al la proceso en Parizo. Multaj eminentuloj estis kompromitaj ; ili decidis malaperigi S-ron Karatal kaj liajn dokumentojn. Mi estis larĝe pagita por organizi la aferon.

Kun komplicoj mi okazigis akcidenton sur la strato por malfruigi la alvenon de Karatal en Liverpool ; mi volis, ke li petu specialan trajnon. En la antaŭa nokto ni estis instalintaj sur la trabegoj de la antaŭa mallarĝa relvojo, kondukanta al forlasita minejo, normalan vojon kaj trakoforkon por devojirigi la trajnon kaj ĝin konduki al minejo-puto, kiun ni estis larĝe malfermintaj.

Smith, la hejtisto, kaj M. Ferson la trajno-ĉefo, kontraŭ forta sumo helpis nin. Lastmomente Salter, la mekanikisto, rifuzis. Smith kapenfrapis lin ; Salter falis ekster la lokomotivo sur la taluson kaj mortiĝis.

Smith malrapidigis la lokomotivon kaj ĵus antaŭ ol salti — samtempe kiam Mac Ferson — li klučis ĝin en plena rapideco.

Revolvero ĉemane ni ekzamenis la vagonojn ; la du pasaĝeroj subite stariĝis ĉe la fenestroj ; Gomez, esperante savi sian vivon rapide ĵetis al ni la tekon ; tro malfrue !

Jam la lokomotivo plonĝis en la faŭkon de la puto ; la vagonoj amasiĝis unu super la alian ; en fulmotondra eksplodo, meze de vaporo kaj fumo, la trajno malaperis en la profundo de la minejo.

Rapide ni forprenas la relojn kaj la trakoforkon ; ni ŝtopas la minejon... kaj malaperas.

Kompreneble mi gardis la tekon kun la dokumentoj.

Do, Sinjoroj, bone pripensu mian proponon.

Mi volas aldiri kelkajn vortojn por S-ino Mac Ferson : ŝi povas reedziniĝi. Ni ne plu povis fidi ŝian edzon, kiu estis preta perfidi nin.

POR VIA DISTRO

SOLVO DE LA ANTAŬAJ PROBLEMOJ

La patrino de la simio : Kiam la patrino estas trioble pli aĝa ol la simio, iliaj aĝoj estas respektive : 3x kaj x. Do la konstanta diferenco estas 2x. Kiam la simio estos trioble pli aĝa ol la patrino estis, li estos 9x. Kiam la aĝo de la patrino estas la duono ĝi estas 4 1/2 x kaj tiu de la simio 2 1/2 x. Dufoje tiu aĝo, 5x, estas la aĝo de la patrino en la problemo kaj la simio estas 3x-jara.

$5x + 3x = 4.$

$x = 1/2$ kaj $5x = 2\ 1/2.$

Pezo de la simio = pezo de la pezilo = 40 uncoj.

Oni diras al ni, ke : 40 + pezo de la ŝnuro = 1 1/2 (40+40—40).


Pezo de la ŝnuro : 60—40 = 20 uncoj.

Longeco de la ŝnuro : 5 futoj.

La koloraj ovoj : Unu el la filoj ricevis du bluajn ovojn (10 f.) kvar ruĝajn (12 f.) kaj du flavajn (2 f.) ; la du aliaj filoj ricevis po tri bluaj ovoj (15 f.), du ruĝaj (6 f.) kaj tri flavaj (3 f.).

NOVA PROBLEMO

Krucvort-Enigmo



Atentu (r) = nur radiko !

HORIZONTALE

2. franca artikolo ; monvaluto (r) ; nombro.
3. konjunkcio ; krure kripla (r) ; konjunkcio nea ; parenco (r).
4. skribmaterialo (r) ; doni manĝaĵon kaj trinkaĵon (r) ; arbostrato, avenuo (r).
5. konsonanto ; nedifina pronomo ; cifero ; prefikso ; konsonanto.
6. kio impresas flarsenton ; konsonanto ; grandflora egiptahinda akvoplanto (r).
7. refleksiva pronomo ; longkrura birdo (aŭ levmaŝino) (r) ; sinsekvo (ankaŭ prefikso) (r) ; artikolo.
8. ano de vaganta popolo (r) ; konsonanto ; substanco interne de ostoj (r).
9. adverba finaĵo ; prepozicio ; ortodoksa pastro (r) ; persona pronomo ; adjektiva finaĵo.
10. verdejo en dezerto (r) ; longa oficiala vira robo (r) ; korta birdo (r.).
11. tiel nomata ; perlipa amesprimo (r) ; perforte forpreni (r) ; disdivida prepozicio.
12. malgrandulo (r) ; projekcia tuko (r) ; prepozicio.

VERTIKALE

2. duobla sulfato de metalo (r) ; plej alta spirito ; membraro (r).
3. trinkaĵo (r) ; demanda pronomo ; punkto egaldistanca de la ekstremaĵoj (r) ; negacio.
4. konsonanto ; konsonanto ; levaparato (r) ; konsonanto ; konsonanto.
5. poste-ularo (r) ; regula aranĝo de aferoj (r) ; variebla pronomo montranta posedon.
6. ludo (ankaŭ mantelo kun kapuĉo) (r) ; imperativa finaĵo ; je Pasko.
7. prepozicio ; akvero (r) ; korpoparto (r) ; prefikso.
8. reguligita akvofluejo (r) ; konsonanto ; solena armea revuo (r).
9. parto de la kapo (r) ; finiĝo de difinita spaco (r) ; amfibia besteto saltanta.
10. dufoje la sama konsonanto ; geologia tavolo terciara (r) ; konsonanto ; konsonanto.
11. participo ; parto de teatraĵo (r) ; ampleksa (laŭ la tria dimensio) (r) ; konjunkcio.
12. rusa rivero ; homo, persono ; muzika teatraĵo (r).

HISTORIETOJ

Gentileco : De unu jaro mi nemiam parolis al mia edzino, konfesas edzo al amiko.

— Kial ? Ĉu vi estas separitaj ?

— Ne, respondas la edzo. Sed mi ne volas ŝin interrompi !

Bonŝanca : Du boksistoj malvigle alfrontiĝas ; tiel malvigle, ke la publiko enuas kaj protestas.

Subite unu spektanto stariĝas kaj krias : He ! Jo, kuraĝu !

Estas la momento ! Frapu lin ! Ci havas la venton por ci !

Efikoplena : En Ĉikago, ĉe enirejo de Belo-Instituto afiŝeto antaŭavertas la klientinojn : « Se ni estas devigataj preni viajn fingro-premaĵojn estas por vin rekoni, kiam vi foriros ! ».

GRAMATIKO PER BONHUMORO

ADJEKTIVO

La Adjektivo havas A - finaĵon kaj esprimas la kvaliton de la substantivo (aŭ pronomo) al kiu ĝi rilatas.

1) **Ni ne konfuzu Adjektivon kun Adverbo**

Adjektivo difinas Substantivon kaj respondas la demandon KIA ?

— la vetero estas bon**a**.

Adverbo difinas Verbon kaj respondas la demandon KIEL ?

— li kantas bon**e**.

2) **La Adjektivo povas esti :**

— **Epiteto** (ĝi akordiĝas nombre kaj kaze kun la substantivo) : mi vidas la belaj**n** florojn.

— **Predikativo :** ĝi akordiĝas nur nombre kun la substantivo : li konsideris tiu**n** libro**n** tre interesa**j**.



Kuirista reputacio


— Mi trovas tiun manĝaĵon stranga ; se estas supo mankas salo ; se estas kremo, mankas sukero.

— Mi nenion forgesis ! Mi pensis, ke duono de tiu manĝaĵo, kun salo, estos supo, kaj ke la alia duono, kun sukero, estos deserto.



Nekontesteble

Mi prave kontestas paĉjo. Ne mi estas puninda ; ĉar estas vi, kiu montriĝis nekapabla bone celi kaj maltrafe ĵetis al mi la pilkon.



Enviemo

Certe oni ĉiam opinias multe pli bona tion, kio montriĝas neatingebla.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (120 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (220 fr.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (2,50 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (35 kr.).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, Donnerink 10 C 20 05800 **Hyvinkää** (23 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (15 mk.).

Hispanujo : S-ro Manuel Romero Gomez, Arzobispo Apaolaza, 32-Ent. A ZARAGOZA (320 pes.)

Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Benedetto Alfieri, 24, 28100 NOVARA — p.ĉ. 23/16532 (2 500 lires).

Japanujo : S-ro Tara Nišiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (1 800 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (80 d.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL. ZH pĉk 209721 (15 guld.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Solveïen 143-B, LJAN (30 kr.).

Peruo : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO.

Rumanio : S-ro Radu Pàtrascu, str. Pompiliu Manoliu 13 Bl. G2 ap. 75-7000 Bukareŝto-39.

Sovetunio : S-ro Alik Melnikov, ab jaŝ 393 Rostov Don — 7.

Svedujo : ESPERANTOFORLAGET, Fack. 200 42 MALMO 7, ĝiro 578 (24 kr.).

Svislando : S-ro Cl. Gacond. Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (20 fr.).

Usono : S-ro Jones R. Kent, 3318 N. Lake Shore Drive, n° 801, CHICAGO, Illinois 60 657.

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per respondkuponoj (20 respk.).



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier

Le Gérant : P. BABIN

Supplément au n° 6 de 1976, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Malgré les promesses les travaux ont trainé. Il semble bien cependant qu'avant Noël l'essentiel sera terminé. Il restera à peindre, tapisser, aménager. Du travail sur la planche !

Le Conseil d'Administration, dans sa réunion du 24 octobre, a mis au point le programme des activités pour 1977. Le découpage des périodes reste inchangé mais l'ordre en est modifié. La première période sera consacrée, en 1977, à des conférences, la deuxième et la troisième voyant se dérouler les cours habituels. Cette modification nous avait été demandée depuis plusieurs années par des étrangers qui, assistant à un congrès international à la fin du mois de juillet et n'ayant plus de congé en août désiraient cependant assister ou prendre part à nos séries de conférences. Nous verrons bien si ce changement, qui va bouleverser quelques habitudes, répond au désirs exprimés.

Autre nouveauté : le cours individualisé. Cette expérience est basée sur la constatation que, très souvent, les personnes qui sont surtout interessées par la pratique de la langue, par ce qu'il est convenu d'appeler le deuxième degré, arrivent à des dates diverses et que même si le nombre d'élèves est relativement constant c'est que les arrivées en cours de route compensent à peu près les départs. D'autre part le niveau de connaissances est très variable. Il devient donc très difficile de faire un cours qui commence le premier jour du stage et se déroule régulièrement jusqu'à la fin. Il arrive souvent que l'auditoire du dernier jour ne soit que dans une petite mesure le même que celui du premier jour. L'idée lancée par monsieur Boyet est donc que le professeur du cours de « pratique de la langue » soit disponible pour faire progresser chaque élève à partir du niveau qui est le sien le jour où il arrive. Pour cela il faut que chacun apporte son manuel habituel. La tâche sera rude pour le professeur mais l'expérience vaut la peine d'être tentée, et bien évidemment nous engageons tout le monde à arriver dès le premier jour de cours.

Le programme de 1977, année du 25e anniversaire de la Maison Culturelle, est à votre disposition. Dès maintenant réservez vos places. D'autres, prudents, l'ont déjà fait.

Nous comptons sur vous tous pour assurer le succès de l'année 1977.

P. BABIN.

LA REVUE

La plus grande partie des abonnés a réglé l'année 1976. Il reste cependant encore quelques retardataires. Nous leur demandons de se mettre en règle rapidement ou de nous prévenir s'ils n'ont pas l'intention de le faire. N'oubliez pas que toutes les autres revues exigent le paiement de l'abonnement avant même de faire le service. Alors, ne tardez pas trop à payer votre abonnement pour 1977.

Abonnements bienfaiteurs (suite)

G. Lhéritier (92)	30,00
G. Clopeau (28)	30,00
R. Mélo (03)	30,00
A. Debertonne (78)	30,00
H. Mousset (2 ans) (75)	60,00
H. Chaillou (17)	30,00
M. Cuvelier Delassus (59)	30,00
R. Curnelle (59)	30,00
E. Jouy (76)	30,00
R. Bénazet (66)	30,00
J.-M. Matzinger (67)	30,00
L. Marin (93)	30,00
M. Serre (66)	50,00
J.-L. Texier (91)	30,00
J. Kraemer (54)	30,00
C. Kraemer (68)	30,00
R. Blatier (49)	30,00
L. Cambillard (91)	40,00
L. Mee (Nederlando)	30,00
L. Chasseriaud (17)	30,00
I. Nagy (Hungario)	30,00
M. Granier (38)	30,00
M. Robert (13)	30,00
P. Poly (75)	30,00
G. Gerrier (75)	30,00
G. Dieusaert (92)	30,00
P. Boissou (75)	30,00
M. Moreau (33)	50,00
J. Comadran Dalmau (04)	50,00
C. Suchareau (75)	30,00
C. Martin (35)	30,00
G. Drezet (25)	30,00
P. Fort (10)	30,00
Esp. Grupo Kassel (All. Féd.)	30,00
F. Herbst (All. Féd.)	30,00
A. Polhaus (All. Féd.)	30,00
M. Purshke (All. Féd.)	30,00
J. Weidacher (All. Féd.)	30,00
H. Wielgus (All. Féd.)	40,00
H. Dieter Hartig (All. Féd.)	30,00
H. Rinke (All. Féd.)	30,00
TOTAL	1 340,00

Conseil d'administration du 24-10-76

M. Babin ouvre la séance à 10 heures.

Présents : Mmes et MM. Babin, Bodereau. Boyer, Cheverry, Dairon, Guillot, Jacquesson, Jelenc, Mathé, Métivier, Prévost.

Absents excusés : Mmes et MM. Chevalier, Ciret, Guillaume, P. Jacquesson.

ORDRE DU JOUR :

I. — STAGES 1976 :

Afin de cerner de plus près la réalité des stages, Jean-Paul Guillot s'est livré cette année à une étude statistique dont les résultats essentiels figurent ci-dessous.

Première période :

Administration : M. et Mme Babin.

1.900 nuits ; une moyenne de 90 personnes avec une journée maximum de 141 repas servis ; âge moyen : 39 ans, avec un maximum entre 40 et 50 ans. — 50 % ont participé intégralement au stage.

Deux sortes d'activités : le stage de Grésillon traditionnel et le stage ICEM à partir du 12/7 (préparation au RIDEF en Pologne).

Deuxième période :

Administration : M. et Mme Dairon.

1.252 nuits ; une moyenne de 59 personnes par jour pendant 21 jours avec une journée maximum de 68 personnes ; 57 % ont fait intégralement le stage ; âge moyen : 41 ans (avec maximum entre 0 et 10 ans, 30 et 40 ans, après 60 ans).

Pas de problèmes particuliers du point de vue activités, sauf un flottement en ce qui concerne l'organisation d'une ou deux conférences ; soirées animées par MM. Ligot et Mac Lennan.

Cours : pour la première fois des cours étaient organisés à cette période ; il n'y a pas eu de cours du premier degré ; une dizaine de personnes entre 15 et 25 ans ont suivi ceux du 2e degré ; le niveau des participants était très hétérogène, les méthodes d'apprentissage de la langue différentes, la durée du séjour des intéressés très variable. Pour l'avenir et dans un souci de plus grande efficacité, M. Boyer suggère que l'on organise des cours adaptés aux fluctuations des participants, c'est-à-dire des cours sans interruption, sans calendrier et sans programme particulier, ainsi que des rencontres et activités de perfectionnement au niveau du second degré : le matin se ferait un travail individuel, chaque participant ayant son matériel

personnel, le professeur faisant office de conseiller ; l'après-midi serait réservé à la langue parlée en tenant compte du niveau général. Proposition adoptée pour les deux premières périodes de 1977.

Troisième période :

Administration : M. et Mme J.-P. Guillot.
1.194 nuits ; moyenne 57 personnes dont 44 % ont fait le stage intégral ; âge moyen 44 ans avec un maximum entre 60 et 70 ans.

II. — RESULTATS FINANCIERS PROVISOIRES :

Les résultats définitifs seront connus en mars 1977.

Au 15-10-76 les résultats sont les suivants :

Disponibilités :		**Recettes :**	
C. d'Epargne	: 85 935,00	Séjours :	199 843,54
CCP	11 204,54	(174 000 en 75)	
BNP	7 559,01	Inscriptions :	7 918
Caisse	3 851,91	Tickets :	15 628
		Librairie :	13 000
		Souvenirs :	8 800
		Dons :	2 902
		Parts soc. :	104 000

Dépenses :

Alimentation : 62 000.
Librairie. } en augmentation
Chauffage. EDF } par rapport à 1975.

Investissements prévus pour l'année 76 : 61.180.

Salaires et charges sociales : il faudra payer le rattrapage depuis le 1er juillet 73 pour la retraite complémentaire des employés.

III. — STAGES 1977 :

1) PAQUES :

— Stage de travail du 28 mars au 3 avril.
— Rencontre d'enfants du 3 avril au 9 avril

2) PRINTEMPS :

— Week-end M. Delaire.
— Stages professeurs de mathématiques.

3) PENTECOTE :

— Universités populaires.

4) ETE :

M. Babin fait part au conseil de la demande qui lui a été faite au Congrès d'Athènes par certaines personnes : organiser les semaines internationales de Grésillon comme premier stage afin d'éviter le chevauchement avec les autres stages internationaux. Le Conseil satisfait à cette demande.

Première période :

Du lundi 4 juillet au matin au 23 juillet au soir.
Administration : M. et Mme Babin.
Conférences ; 25e anniversaire de Grésillon
Excursions.
Cours (voir nouvelle pratique indiquée ci dessus) ; M. Bénistant.

Deuxième période :

Du 25 juillet au 13 août.
Administration : M. et Mme Dairon.
Excursions ; activités diverses.
Cours : M. Boyer.

Troisième période :

Du 15 août au 3 septembre :
Administration : M. et Mme Mathé.
Excursions ; activités diverses.
Cours.

Tarifs : Plus de 3 jours.		**Moins de 3 jours**
Chambre 1 pers.	: 50 F.	57
Chambre famil.	: 44 F.	51
Chambre com.	: 37 F.	44
Campeurs	: 35 F.	37
3 à 6 ans	: 22 F.	25
1 à 3 ans	: 12 F.	16

IV. — TRAVAUX EN COURS OU ENVISAGES :

— Réfection des chambres du premier étage aile nord : circuit électrique, cabinets de toilettes, cage d'escalier, carrelage ;
— canalisation fosse septique ;
— étude du projet d'assainissement et protection de la nature par M. Kristos (avis favorable du Conseil) ;
— plantation d'arbres sur le terrain de camping ;
— achat d'une chaine pour l'entrée de la propriété.

V. — QUESTIONS DIVERSES :

— Enlèvement des ordures par voiture personnelle du jardinier : le Conseil accepte de lui rembourser le montant de son assurance,
— téléphone : Grésillon sera raccordé au réseau automatique en janvier : nouveau numéro : **89.10.34 ;**
— devis pour installation d'une sonnerie dans le bloc dépendances ;
— imprimerie : réédition de « Por la Praktikantoj » : 1.000 exemplaires (coût : 8.796,00 F H.T., en offset) ;
— achat d'un tableau feutre pour les réunions dans le salon.

L'ordre du jour étant épuisé, M. Babin lève la séance à 16 h. 15.

Le Secrétaire de séance,
F. MATHÉ.

NOUS TENONS EGALEMENT A VOTRE DISPOSITION :

Cartes postales de Grésillon : noires :	0,60 F.
couleur :	0,80 F.
Cuillères de colection :	13,00 F.
Pendentifs :	12,00 F.
Disques de stationnement :	4,00 F.
Etoiles pour vitres de voitures :	2,00 F.

Pensez à acheter :

FALSAJ AMIKOJ

en Esperanto

de R. Bernard et A. Ribot

3,50 F. (+ port : 4,45 F.)

VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude
Vos dictionnaires
Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie

à M. CIRET
« La Timeraie »
VIEIL-BAUGÉ - 49150 BAUGÉ

Etablir les chèques de paiement à :

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE
C.C.P. Nantes 1485-39

Prix franco au-dessus de 20 Fr.
Demandez notre catalogue

POUR VOS COURS DE PERFECTIONNEMENT

Le livre qu'il vous faut :

POR LA PRAKTIKANTOJ
de **P. Babin**
Prix : **10,00 Fr.**

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 40,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

LES EXTRAITS

DE NOTRE CATALOGUE

... aujourd'hui

des livres d'étude

NI PAROLU EN ESPERANTO,
en 12 leçons + corrigés : 6 frs.

DICTIONNAIRE FRANÇAIS-ESPERANTO,
par Léger-Albault : **23 frs.**

COURS D'ESPERANTO « TRA LA MONDO »
6 disques microsillons et 7 livres
pour francophones et anglophones
(le préciser à la commande) : 86.70 frs